

Esperanto en Azio kaj Oceanio

n-ro 104, Julio 2019

Bulteno de KAOEM

Azia-Oceania Komisiono de UEA pri Azia-Oceania Esperanto-Movado

◆ Salutas novaj estraranoj de KAOEM

Novaj rimedoj forigos la kontinentan distancon!

Prezidanto, s-ro Nisinaga Atusi



Al karaj amikoj kaj kunlaborantoj, kore salutas Nisinaga Atusi la nova prezidanto de la Komisiono pri Azia-Oceania Esperanto-Movado (KAOEM). Kaj mi esprimas elkorajn dankojn kaj estimojn al la antaŭa gvido-teamo, la prezidanto d-ro So Jinsu, vicprezidanto S-ro Inumaru Fumio kaj sekretario S-ro Chimedtseren Enkhee.

Bonvolu permesi al mi iom skribi pri mi mem. Mi naskiĝis en la intermonta urbeto Ŝobara en Gubernio Hiroŝimo kaj nun laboras en la Centra Oficejo de Oomoto en Kameoka en Gubernio Kioto.

Mi estas denaska Oomotano, kaj post esperantistiĝo en 1974, kiel funkciulo de Junulara Fakoj de Oomoto, organizis Esperanto-karavanojn al Ŝanhajo, Cindao kaj Pekino (Ĉinio) en 1988, al Busano, Teguo kaj Seulo (Koreio) en 1989 kaj al Ĥabarovsko kaj Vladivostoko (Sovetio tiama) en 1990. Mi organizis ankaŭ la 10an Komuna Seminarion en Kameoka 1991.

Mi estas individua membro de UEA de 1982, fakdelegito de 2003 kaj ĉefdelegito en Japanio de 2017.

Aliaj ankoraŭ ne facile kaptas la ideojn de Esperanto rilate al la monda amikeco, interkompreniĝo, lingva problemo kaj tiel plu.

Mi tamen konsideras ke la defioj ekzistas ne por malhelpi la disvastigon de Esperanto.

Tial mi daŭre havas motivon kaj kuraĝon por disvastigi la belecon de nia lingvo al miaj samlandanoj.

(Inumaru Fumio tra helpo de s-ro Isino Yosio)

Filmoj pri la AOK-9

• Ceremonioj kaj programeroj: <https://youtu.be/1U1y7Vau2Ck>

• Vesperoj kaj akceptoj: <https://youtu.be/7oTQdHIIWYs>

(la raportoj pri AOK-9 preparita de s-ro INUMARU Fumio.)

■ Prelego laŭ la kongresa temo

la 26an de aprilo 2019

"Esperanto kaj kulturaj diversecoj de Azio kaj Oceanio"

La sekvanta eseo estas modifita de la preleganto mem. Kaj la originala video spekteblas ĉe la retejo: <https://www.youtube.com/watch?v=wejfeo8exfU>

Esperanto kiel pensilo pri kultura diverseco

d-ro A. Giridhar RAO

(Universitato Azim Premji, Bengaluro, Barato)

La temo de kultura diverseco gravas pro du ĉefaj kialoj: la unua, ekonomia, kaj la dua, politika. Ekonomie, ni loĝas en tutmondiĝanta mondo kiu volas, ke ni ĉiuj manĝu same, portu la samajn vestaĵojn, havu la samajn valorojn, kaj konsumu la samajn varojn – unuvorte, ni ĉiuj vivu same. Indas rezisti tion ĉar nia homeco kuŝas almenaŭ parte en nia diverseco – “ne samas la kvin fingroj,” kiel diras proverbo hindia.

Aliflanke estas la politika tendenco nuntempa bari la vojon al fremduloj, enmigrantoj, rifuĝintoj – alivorte, starigi murojn kontraŭ la “ne-nianoj”. Sur planedo kun tiom da homoj, kaj en civilizacio kun

tiom da ligoj inter homgrupoj, necesas paca kunekzistado; ni daŭre kultivu la arton kunvivi kun diverseco. Ni argumentas, ke Esperanto – kaj la lingvo kaj la idearo – proponas bonajn rimedojn por pensi pri kaj agadi por kultura diverseco en nia mondo.

La argumento de la eseo estas en du partoj. En la unua parto ni parolos pri Esperanto kiel rimedo por konsciigi la eksteran mondon pri la kultura diverseco en niaj landoj. La dua parto de la eseo traktos Esperanton kiel ilon por pensi ene de niaj landoj pri la kultura diverseco.

Eksterlande. Tipe, en ĉiu lando, turismaj instancoj de la registaro jam produktas diversajn materialojn pri la allogeco de la lando. Abundas retejoj, libroj, dokumentoj, broŝuroj kaj afiŝoj pri vizitendaj lokoj kaj la vidindaĵoj kaj ĝuindaĵoj tieaj. Aldone estas amaso da private produktita materialo. Ni ja uzu tiujn (ofte altkvalitajn) materialojn, kaj eventuale esperantigu ilin. Tamen, ni esperantistoj povas kontribui ankaŭ alimaniere. Al niaj geamikoj el la Esperantujo, ni montras niajn ĉiutagajn vivojn – kion ni manĝas, kiel ni vestas nin, kiajn geamikojn ni havas; sume, niajn ordinarajn vivritmojn.

Ĝuste tial valoras kultivi kaj pligrandigi niajn amikec-retojn kiel Pasportan Servon, kaj aliajn sociajn retojn. Valoras verki en la Vikipedio artikolojn pri malgrandaj aferoj: niaj urbetoj, lokaj manĝaĵoj kaj festoj, ekzemple – aferoj ofte neatentataj de registaraj kaj komercaj instancoj. Ankaŭ utilas produkti mallongajn video-raportojn pri aferoj lokaj kaj alŝuti ilin al, ekzemple, al la klubna kanalo surreta. Jes, notindas, ke ĉio ĉi estas agado individua ĝis klubnivela. La turismaj instancoj montras la vivon ĉe la pintoj; ni esperantistoj invitas geamikojn al la vivo en la valo!

Enlande. Esperanto rolas grave ankaŭ ene de niaj landoj. Kompreneble gravas instrui la lingvon mem; sed gravas ankaŭ la idearo de Esperanto. Mi donu la ekzemplon de la kurso “Esperanto kaj lingva demokratio” kiun mi gvidas en Universitato Azim Premji [premĝi], en Bengaluro, Barato. La celo de la kurso ne estas, ke la studentoj lernos nian lingvon. En la kurso, ni esploras diversajn aspektojn de la lingva diverseco de Barato. Esperanto estas prezentata kiel unu funkcia modelo de strebo al lingva demokratio.

Pasintjare, ekzemple, en kurskomenca lingva enketo, ni malkovris pli ol 30 lingvonomojn inter la 45 homoj en la klasĉambro! Pripensante siajn proprajn lingvovivojn, la studentoj rimarkis la hierarkiojn en la prestiĝo de tiuj lingvoj. Post iom da esplorado, ili ekkomprenis, ke lingvoj iĝas prestiĝaj pro kialoj politikaj kaj ekonomiaj; t. e., la kialoj estas sociohistoriaj, ne lingvaj. Ĉi tiu kompreno instigis ilin repensi pri antaŭsupozoj pri la kategorioj “lingvo” kaj “dialekto”. Ili jam bone sciis pri diskriminacio laŭ la aksoj de regiono, ekonomia klaso kaj, en Barato, kasto. Nun ili pensis ankaŭ pri lingvaj nejustecoj. Espereble, kiam tiuj ĉi studentoj mem ekinstruos en lernejoj, aŭ verkos studprogramojn, ili estos pli sentemaj kaj inkluzivemaj pri la kultura, aparte la lingva, diverseco de la lernontaro. Tiel, la fokuso estas ne la lingvo Esperanto mem, sed la vaste dividitaj valoroj de la Esperantujo – ekzemple tiuj kiuj troviĝas en la Praga Manifesto. Mi aldonu, ke kursofine, restas sufiĉe pozitiva impresio pri Esperanto, kaj preskaŭ ĉiuj el ili kapablas krei, “Saluton!” kaj “Ĝis revido!”

Konklude do, Esperanto ja estas valora pensilo pri la kultura diverseco. Esperanto-movadoj povas kunlabori kun jam ekzistantaj instancoj turismaj por reklami pri la landa bunteco. Sed nia forto ankaŭ estas, ke pere de nia komunikilo Esperanto, ni interŝanĝas spertojn pri niaj ordinaraj, ĉiutagaj vivoj. Ni kultivu tiujn lokajn aspektojn diversmaniere ĉe nia individua kaj kluba niveloj. Enlande gravas ja la instruado de Esperanto. Sed gravas ankaŭ la disvastigo de la valoroj de la Esperantujo – komunika justeco, lingva inkluzivemo, kaj respekto kaj festado de lingva diverseco. Ju pli ofte ni montrus tiujn valorojn des pli forta estus nia argumento por Esperanto. En mondo plene de kialoj por pesimismo, Esperanto estu inter nia rimedaro por optimismo. Kiel diras la urdua poeto Faiz Ahmed Faiz [fez]:

“Ne senesperas la koro,
nur senpova ĝi estas.
Longas la nokto de l’tristo,
sed nur nokto ĝi estas.”

(d-ro A. Giridhar RAO: rao.giridhar@apu.edu.in)